FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2012



Der Joachim-Gießner-Weg in Herzberg Foto. Siegfried Krüger

Die Nord-Süd-Eisenbahnstrecke: durch Thüringen?



Die für die Eisenbahn in Deutschland sehr bedeutende Eisenbahnstrecke Hamburg-Hannover-Göttingen-Bebra-Fulda-Frankfurt (M) führte etwa 4 km durch Thüringen und damit ab 1945 wegen Einrichtung der Zonengrenzen aufgrund des „Londoner Protokolls" durch die Sowjetische Besatzungszone. Über diese Strecke wurde die Versorgung der amerikanischen Besatzungszone abgewickelt. Dies führte im Bereich südlich von Eichenberg dazu, dass die beiden Ortschaften Neuseesen und Werleshausen (einschl. Haltepunkt) im Kreis Heiligenstadt zur Sowjetischen Zone gehörten und die Ortschaften demgemäß von sowjetischen Soldaten besetzt waren. Als der Eisenbahnverkehr am 10.8.1945 nach der Wiederherstellung einer noch von deutschen Pionieren gesprengten Brücke über die Werra wieder in Gang kam, hatten die Sowjets jeweils am Beginn ihrer Zone neben den Gleisen zu Kontrollzwecken Schilderhäuschen aufgestellt. Es waren leider darüber keine Vereinbarungen zwischen den Siegermächten geschlossen worden, was dazu führte, dass die sowjetischen Soldaten manchmal Züge anhielten, manchmal ohne weiteres fahren ließen. Dabei kam es auch zu einem Schusswechsel gegen einen Lokführer, der nicht wusste, wie die Situation war und demgemäß nicht gehalten hatte. Der Lokführer verstarb. Zwischen den Befehlshabern der beiden Siegermächte wurde verhandelt und die Züge fuhren eine Zeitlang wieder. Aber vom 13. bis 15.9.1945 wurden erneut Züge durch die Sowjets angehalten, so dass nunmehr eine

Regelung unumgänglich war, weil die Amerikaner ihre Versorgung sicherstellen wollten. Dies führte zum „Wanfrieder Abkommen“ vom 17.9.1945 zwischen beiden Mächten. Danach wurde das Territorium mit den beiden genannten Orten (und dem Bahn-Haltepunkt) der amerikanischen Zone zugeschlagen und dafür die Dörfer Asbach, Sickenberg, Vatterode, Henningerode und Weidenbach (im Hinterland von Bad Sooden-Allendorf und ohne Bahnanschluss) der sowjetischen Zone. Dadurch war die ungehinderte Durchfahrt geregelt und es kam zu keinen weiteren Störungen. Diese Dörfer hatten damit ihre Zugehörigkeit zu Thüringen bzw. Hessen gewechselt und auch nach der Wiedervereinigung blieb es dabei. Inzwischen wurde allerdings der Haltepunkt Werleshausen geschlossen, d.h. Die Züge halten dort nicht mehr. Das Wanfrieder Abkommen wurde im Kalkhof (Gutshof am Rande von Wanfried) abgeschlossen und wenn heutzutage im Hessischen Fernsehen eine Sendung er-folgt, in der Wanfried erwähnt wird, wird meist auch das Zimmer im Kalkhof gezeigt, wo dieses Abkommen unter-zeichnet wurde. Im Museum von Wanfried wird ein Film gezeigt, der dieses Ab-kommen behandelt. Die Strecke selbst hat inzwischen durch die Neubaustrecke Fulda-Kassel-Hannover an Bedeutung verloren.

Zuweilen waren sowohl die Eisenbahnstrecke als auch die dortige Demarkationslinie als „Whisky-Wodka-Linie“ bezeichnet worden, nach den Trinkgewohnheiten der Soldaten der Besatzungsmächte.



Quellen:
Grenze über deutschen Schienen, Rossberg, Eisenbahn-Kurier-Verlag, 1980,
Mitten durch Deutschland; Kreutzkamp/Heigl, Verlag:Frederking+Thaler, München, 1996,
Leben im Schatten der Grenze; Saul; Sparkassen-Stiftung Wanfried, 1999,
Thüringen; Blätter zur Landeskunde, 2005(55),

Die Fotos zeigen:
= ehem.Haltepunkt Werleshausen, Mai 2012
= Gutshof Kalkhof bei Wanfried. Mai 2012

Resumo:
La fervoja linio de Hamburgo al Frankfurto tra Bebra – ekde ĉiam tre grava – kondukis ankaŭ tra Turingio, kiu post 1945 apartenis al la Soveta Okupacia Zono. Tio komplikis la transporton. Pro tio okazis la tielnomata „Traktado de Wanfried" inter la usona kaj soveta armeoj, resp. Ties ĉefoj. Oni reguligis la interŝanĝon de du turingiaj vilaĝoj kontraŭ 5 el Heslando, tielke poste la fervoja itinero ne plu trapasis la sovetan zonon. Ankaŭ post la reunuiiĝo de Germanio oni ne plu ŝanĝis la situacion. La urbo Wanfried en Hesio pro tio ĉiam ligas al tiu traktado, ke oni produktis eĉ filmon pri la afero, montrante ĝin en ties muzeo. La fervoja linio perdis intertempe iom de la signifo, ĉar ekzistas ja novkonstruita itinero inter Fulda kaj Hanovro

Walter Ullmann, Friedberg (Hess)

La jubileo

Sinjoro Weber hodiaŭ laboris 25 jarojn en tiu firmao.
Li atendas reagon. Sed neniu interesiĝis aŭ gratulas lin.
La ĉefo preteriris. Li alparolis lin, sed la ĉefo ne havis tempon.
Sinjoro Werber ne atendis tian reagon kaj pli kaj pli li ĉagreniĝis.
La sekretariino, kiun li tre ŝatis, konsolis lin. Ŝi diris "Vizitu min hodiaŭ vespere. Ni aranĝos agrablan tempon."
Li estis felilića kaj venis akurate kun bela bukedo. I
Ili trinkis glason da vino kaj la interparolo estis tre ĝentila.
Subite ŝi diris: "Mi nun iras en la apudan ĉambron. Kiam mi estos preta mi vokos juhuu, juhuu."
Daŭris ja iom da tempo, sed finfine li aŭdis laŭtan juhuu.
Li kuris rapide kaj malfermis la pordon kaj antaŭ li staris la tuta personaro preta festi lian jubileon.
Sed tion tute ne plaĉis al li, ĉar li estis vestita nur per ŝtrumpetoj.

Aŭdita dum gaja kuneno en maljunulejo.
Dieter Hartig.

Google spricht jetzt auch Esperanto

Als 64. Sprache im Übersetzungsdienst hinzugefügt

(D.E.B.) "Weltweite Hilfssprache für alle Menschen", so lautet die Überschrift der Information im Google Translate-Blog vom 22. Februar 2012. Thorsten Brants, wissenschaftlicher Mitarbeiter von Google Translate schreibt, dass Esperanto soeben den verfügbaren Sprachen bei Google Translate als 64. Sprache hinzugefügt wurde. Brants informiert weiter, dass es heute, 125 Jahre nach der Veröffentlichung des ersten Buches zu Esperanto, hunderttausende aktive Sprecher gibt, vermutlich Millionen mit geringen Sprachkenntnissen und sogar etliche hundert Menschen, die Esperanto als eine ihrer Muttersprachen beherrschen.

El fervoja mondo

Ĉeĥio: Veturilkombinaĵo serio 471 „Elefanto“ kun nova farbado

Lundon, la 8-an de oktobro 2012 okazis en Praga Ĉefstacio malgranda solenaĵo – en kiu estis prezentata al publiko veturilkombinaĵo 471 011 „Elefanto“ kun nova farbado PID (Praga Integra Trafiko). La solenaĵo okazis por omaĝi 20-an datrevenon ekde komenco de kunlaboro inter Praga Integra Trafiko kaj Ĉeĥaj Fervojoj (ČD). Post mallonga alparolo kaj tosto fare de Ĝenerala vicdirektoro ČD Antonín Blažek kun aliaj personoj oni envicigis la „Elefanton“ en normalan ekspluatadon, kaj kiel pasaĝertrajno ĝi ekveturis je 11:12 horo kun pasaĝeroj al urbo Beroun kaj reen.

Estas menciinde, ke aŭtoro de propono por nova farbado de „Elefanto“ estas ĉeĥa grafikisto Vít Stanovský, fervoja entuziasmulo kaj IFEF-favoranto, kiu inter alie proponis grafikaĵojn por la 63-a IFEF-kongreso en Liberec, Ĉeĥio, kaj li estas ankaŭ aŭtoro de akceptitaj grafikaj proponoj por Honoraj Diplomoj transdonataj de IFEF.



Elefanto 471 011 antaŭ sia unua veturo en nova farbado PID la 8- de oktobro 2012 en fervoja stacio Praha hl.nádraží (ĉefa stacio).

Dominika Respubliko: Ĉu en la landon revenos fervojo por pasaĝeroj?

Jam longtempe loĝantoj kaj vizitantoj de Dominika Respubliko ne povas vojaĝi per trajno. Etŝpuraj linioj, ĝis nun restantaj, servas nur por transporti sukerkanon. Lastatempe la registaro proponis al kompanio de Francio konstrui fervojan linion por pasaĝertrafiko. Realigo de la projekto kostos 1,8 miliardojn da dolaroj, de kiu unu miliardon pagos franca firmao. La linio kunligos Santiagon kun San-Domingo. Alia linio de haveno Rio Haino al San-Domingo servos al vartrafiko. Se la projekto realiĝos, ambaŭ linioj povus esti konstruotaj en kvin jaroj.

Germanio: Nombro da dungitoj kreskas

Ekde jaro 1994 germana kompanio Deutsche Bahn kaŭze de reformo de la fervojo reduktas nombrojn de siajn multajn dungitojn. Iom post iome foriris 150 mil da personoj. En la jaro 2011 tiu ĉi tendenco de evoluo haltis, nombro de dungitoj kreskis proksimume je 4 mil, el tiu 1600 en bontenado kaj 1600 en pasaĝertrafiko. Plikreskon oni atendas ankaŭ en jaroj 2012 kaj 2013, en kiuj ĉe Germanaj Fervojoj DB povas aperi 10 ĝis 15 mil de novaj laborlokoj. Germanaj Fervojoj poste povas havi en la tuta mondo 296 mil da dungitoj. Ilia aĝa konsisto tamen ne estas ideala, ĉar 42 procentoj aĝas pli ol 50 jarojn.

Preparis Jindřich Tomíšek - Reviziis Heinz Hoffmann



Nekrologo

Heinz Schindler

✶19.8.1920 - † 27.9.2012

Jam antaŭ la milito, kiel lernanto en lernejo kaj sur la fervojo, li tre interesiĝis pri fremdaj landoj kaj vojaĝoj. Post lia sovetia malliberigo, li restis kiel fervojisto en sia hejmurbo *Meißen (majsen).* Kiam oni ofertis en novembro 1946 Esperanto-kurson, li partoprenis. (lia patrino ankaŭ estis Esperantistino.) Sed tri semajnojn pli poste, li translokiĝis al *Schwelm*
(ŝvelm). Tie ĉi estas fondita en marto 1948 Esperanto-grupo, sed en decembro ĝi jam malaperis. En naŭmonata kurso li sufiĉe lernis, ke li povis legi, skribi kaj paroli.
En la jaro 1951 Heinz Schindler vizitis la UK en Munkeno, ankaŭ por tie konatiĝi italon. Per lia helpo Heinz Schindler povis 1951 fari sian unuan eksterlandan vojaĝon tra Italio ĝis Sicilio, unu jaron antaŭ la oficiala ebleco.
Post mallonga kurso, li membriĝis en la jaro 1959 al GEFA. Ek de tiam Esperanto estis kun sia edzino *Hanna* lia vivenhavo. Ili vizitis nun preskaŭ ĉiujn GEFA kunvenojn kaj IFEF-kongresojn. Mallonge: 1962 IFK en Budapeŝto, 1963 UK en Sofio kaj dumviva membro en UEA, 23 jarojn disdono de GEFA-Bultenoj kaj IF en la Federacia Respubliko. 1962 – 1966 li skribis raportojn pri Esperanto-kongresoj por la *Schwelmer (ŝvelmaj)* gazetoj. 1963 UK en *Tokio* kaj vizito de *Korea Resp.*, 1966 refondo de Esperanto-grupo en *Schwelm* (ŝvelm), membriĝo en IPTEA (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio)
post ties refondo dum UK en Budapeŝto (la edzino estis poŝtoficistino), 1967 UEA-vice- kaj fakdelegito, helpanto en IFK Fulda kaj poste ankoraŭ en aliaj kongresoj.1980 li kaj lia edzino laboris ses semajnojn en la infanvilaĝo Bona Espero kaj vojaĝis al Urugvajo kaj Argentino. La FFEA jarkunvenojn ili vizitis ek 1965 pli ol 25-foje. Edzino Hanna estis konata pri ŝia financa helpo al kongresvizitantoj, ekz el Brazilo, Russio, Bulgario kaj Hungario. Ili ambau kune partoprenis en pli ol 60 kongresoj kaj jarkunvenoj kaj li mem en pli ol 115, el tiuj pli ol 25 UK kaj IFK. Lia edzino mortis je la 30a de junio 1993. Heinz Schindler finance subtenis en la senco de sia edzino multajn Esperanto-organizaĵojn,

Esperanto-gazetojn en Ĉinio, Hungario, Bulgario kaj subtenis multajn grupojn kaj personojn el pli ol ok landoj. Kvankam nur mezranga oficisto li vivis modeste en malgranda loĝejo kaj tio estis la sekreto de lia donacemo kaj bonfaremo. Heinz Schindler ne nur multe vojaĝis sed ankaŭ multe korespondis helikpoŝte. En 1999 UEA honoris lin per la fama Premio Deguĉi *) Estas memkompreneble, ke oni honoris lin per honora membreco en GEFA kaj IFEF. Ĝis kelkaj monatoj antaŭ sia morto li ankoraŭ multe vojaĝis eksterlanden kaj ricevis vizitantojn el ĉiuj anguloj de la mondo.

*) La premio Deguĉi estas monpremio kiu celas regule distingi la plej meritajn agantojn kaj projektojn, kiuj aktivas sur la kampo de la utiligo de Esperanto kiel potenca rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de L. L. Zamenhof kaj instruoj de Deguĉi Onisaburo.

Samtiel, la Premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de Universala Esperanto-Asocio, kies Statuto (art. 3c) invitas *"kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj."*La premio estas nomita laŭ la japano Deguĉi Onisaburo. Premio Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto.

Verkis Rolf Terjung kaj Siegfried Krüger

Nekrologo

Margret Brandenburg

✶6.8.1932 - † 21.9.2012

Ŝi konatiĝis Willi, la edzon, post la milito 1949 en Münster, kiam Willi gvidis Esperantokurson. Ŝi estis lernantino ĉe li, ekamiĝis kaj ili geedziĝis 1950. Ili ricevis tri infanojn: 1950 Ulrich, 1952 Guido kaj 1960 Judith. Margret kaj Willi decidis eduki la infanojn dulingve. Do, ili fariĝis denaskaj Esperantistoj.

La nekrogo temas pri Margret. Sed ne estas eble ne mencii la reciprokan fruktodonan enfluon inter Margret kaj ŝia edzo. Ili havis kontakton kun la tuta mondo. Ek de jaro 1956 Margret aktive gvidis aŭ helpis en la UEA-infan-kongresoj en *Kopenhagen, Marseile, Mainz kaj Brüssel.* 1980 ŝi fondis kune kun sia edzo la „Helpasocieton Bona Espero" por la infanvilaĝo „Bona Espero" en Brazilo. Margret estris tiun asocieton ĝis 1993 kaj ŝi ankaŭ vizitis la vilaĝon por tie kunlabori. Multajn jarojn ŝi prilaboris la infanpaĝojn de la ĵurnalo „Monato." Helpis al ŝi multe la spertoj en la propa familio. Ŝi vizitis multnombrajn IFEF-kongresojn, GEFA-jarkunvenojn kaj aliajn naciajn kaj internaciajn kunvenojn. Esencan parton por la glata organizado de la 44a IFEF-kongreso en Münster ni dankas al la senlaca agado de Margret. En la publika vivo ŝi agis kiel laika juĝistino kaj estis membro en la urbkonsilantaro Telgde. Ŝi ŝatis kai helpis protekti la naturon, kiel membro en la asocieto de la Naturamikoj. Sen multaj vortoj ŝi konservis ĉiam sian eklabor-pretecon kaj vivoĝojon.

Verkis: Rolf Terjung



Al ciuj niaj legantoj ni deziras
Benitan Kristnaskon, agrablajn festotagojn
kaj sanan, feliĉon, pacan jaron 2013

****

Kalendaro

27.12.- 3.1. 29-a Internacia Festivalo en Dortmund
Tel. 05624-8007, www.internaciia-festivalo.de

27.12.- 3.1. 11-a Novjara Renkontiĝo en Xanten – kaj paralele
4-a NovjaraInternacia Semajno en Xanten
www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr, lu.esperantoland@gmx.de

28.12 – 2.1. **SANO 3 – La alternativa jarŝanĝa seminario** en Herzberg/Sieber
Tel. 05521-5983, http: //esperanto-urbo.de, esperanto-zentrum@web.de

28.12.-4.1. 4-a Junulara E-Semajno en Naumburg (Saale)
www.jes.pej.pl, jes@pej.pl

Ni funebras pri
Gottfried Drey
el Weiden
Li estis membro de la iam multnombra grupo Weiden,
vizitis multajn de niaj kongresoj kaj mortis 87jaraĝa

Redaktfino por FE 1/2013 estos la 15.2.2013
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de
Spenden auf Konto 953 729 bei Sparda-Bank Hessen (BLZ 500 905 00)